Svisa Esperanto-Societo
Poŝtfako 779
CH-2301 La Chaux-de-Fonds
Tel.: (039) 26 74 07

Februaro 1990

BIBLIOTHÈQUE LA CHAUX-DE-FONDS
LI SVI

# SVISA ESPERSANTO-SOCIETO INFORMAS

## ĜENERALA KUNVENO
Ripeto de la kunvoko

Loko: Berno

Dato: Sabaton, la 17-an de marto 1990

**Kunvenejo: Hotelo METROPOLE, Salono II, Zeughausgasse 26, 3011 Berno**

Horaro: 09h00: Malfermo de la salono kaj instalado de la libro-servo kaj de aliaj standoj. Ekspoziciontoj aŭ vendontoj de dokumentoj bonvolu anonci sin skribe aŭ telefone al la prezidanto ĝis la 10-a de marto.

10h00: Kafumo kaj interkona babilado

**10h30: Malfermo de la Ĝenerala Kunveno**

**Tagordo statuta**

a) Protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunveno aperinta en SER 1989-3 (aprilo).
b) Raporto de la Centra Komitato aperinta en SES informas, februaro.
c) Financa raporto aperinta en SES informas, februaro.
ĉ) Raporto de la kaskontrolantoj aperinta en SES informas, februaro.
d) Raporto de la komisionoj.
e) Elekto de membro de la Konflikto-Komisiono por anstataŭi la demisiinton Alfred WENGER. Kaŭzo de lia demisio: maljuniĝo. Ĉiuj aliaj elektitoj daŭrigas sian funkcion.
f) Buĝeto kaj kotizoj por la venonta jaro. La Centra Komitato proponas, ke la kotizoj restu la samaj.
g) Proponoj. (Ne alvenis proponoj ĝis la statuta limdato.)
ĝ) Diversaĵoj.

**12h00 aŭ seeble pli frue: Fermo de la Ĝenerala Kunveno.**

**12h30:** Tagmanĝo (Menuoj anoncotaj en la venonta SES informas).

## POSTTAGMEZA PROGRAMO

**14h00-14h45: Kiel funkcias VIDEOTEX kaj kiajn servojn ĝi povos alporti al esperanto, kun demonstracioj, fare de s-ro R. DICK, kiun esperantigos Angello MELLINI kaj Franz BRÜGGER.**

**15h00-15h45: Recitalo de Nikolin. Ŝi prezentos kantojn el sia tutmonda repertuaro, kun speciala surprizo: premiero el ŝia lasta kasedo: Lulkantoj.**

16h00: Adiaŭa teumo kaj babilado.

16h30: Fermo de la libroservo kaj de la standoj.

Espero: La prezidanto esperas, ke multaj SES-anoj ĉeestos la kunvenon kaj la la tutcerte tre allogan posttagmezon.

(Claude GACOND)

SVISA ESPERANTO-SOCIETO (SES)

Raporto 1989 de la kaskontrolantoj

La subskribintoj,

Margrit Guldin, Murtenstr. 1, 3008 Bern kaj
Ernst Glättli, Laurstr. 17, 5200 Brugg,

kunsidis la 9-an de februaro 1990 en la domicilo de s-ro Ernst von May en Oberuzwil por revizii la librotenadon de Svisa Esperanto-Societo (SES).

Post detala kontrolo ni povis konstati, ke

- la saldoj el la antaŭa jaro estis ĝuste transprenitaj,
- la prezentita jarkalkulo kaj la bilanco je la 31-a de decembro 1989 rezultas el laŭorde farita librotenado,
- la en la bilanco entenataj aktivoj *) estas dokumentitaj per saldo-pruviloj kaj banko-eltiroj,
- la librotenado estas zorgeme kaj modele farita.

Ĉiuj en- kaj elpagoj efektiviĝis pere de kuranta konto ĉe SKA.

Divenprove ni kontrolis pruvilojn kaj enskribojn. Ili ĉiuj estis korekte registritaj.

| | | |
|---|---|---|
| La jarkalkulo prezentas | enspezojn de | Fr. 10'379.15 |
| | elspezojn de | Fr. 5'453.30 |
| El tio rezultas | gajno de | Fr. 4'925.85 |
| La bilanco atestas | aktivojn de | Fr. 27'602.35 |
| | pasivojn de | Fr. 4'812.50 |
| Sekve de tio prezentiĝas je 31.12.1989 | kapitalo de | Fr. 22'789.85 |

Al SES plue apartenas la tiel nomata "RESERVA KAPITALO" (antaŭe: Elkongresa kapitalo). Ĝi rezultis el la gajno de la 64-a Universala Kongreso de Esperanto 1979 en Lucerno kaj sumiĝis la 31-an de decembro 1989 je Fr. 19'525.75.

Konsiderinda parto de tiu ĉi RESERVA KAPITALO, nome Fr. 9'000.--, konsistas el kaso-obligacioj de Svisa Popola Banko en Bellinzona (SPB), kiuj troviĝas en la manoj de s-ro Kurt Greutert en Giubiasco. Laŭ ekzistanta dokumento la interezo de tiuj obligacioj, almenaŭ por la jaro 1989, estis enkasigita de s-ro Greutert. Pri la restado de la interezo por la jaro 1988 pliaj ekzamenoj alportos klarecon.

SES nun klopodas ricevi de s-ro Greutert kaj la bilojn kaj la enkasigitan interezon.

La kaskontrolantoj proponas al la ĝenerala kunveno de SES aprobi la jarkalkulon 1989 kaj la bilancon je la 31-a de decembro 1989 kaj malŝarĝi la kasiston samtempe esprimante al s-ro Ernst von May la sinceran dankon pro la bone farita laboro dum la tuta jaro.

Bern kaj Brugg, meze de februaro 1989

La kaskontrolantoj:

Margrit Guldin Ernst Glättli

SVISA ESPERANTO-SOCIETO

# BILANCO 1989

## Jarkalkulo

| | Buĝeto 89 | Enspezoj |
|---|---|---|
| Membrokotizoj | 9'000.- | 6'555.- |
| Amikoj | | 0.- |
| Abonoj SER | 300.- | 290.- |
| Donacoj | 1'200.- | 1'532.- |
| Interezoj malnetaj | 1'000.- | 1'966.25 |
| Glumarkoj k.t.p. | | 35.90 |
| Enspez-sumo | 11'500.- | 10'379.15 |

| | | Elspezoj |
|---|---|---|
| SER (8 eldonoj) | 5'000.- | 4'725.75 |
| UEA kotizoj | 200.- | 171.60 |
| Propagando k. varbado | 4'000.- | 0.— |
| CK administrado | 2'000.- | 486.55 |
| Kunvenoj ĝen. k. reg. | 50.- | 0.— |
| Bankspezoj k. diversaĝoj | 250.- | 69.40 |
| Elspez-sumo | 11'500.- | 5'453.30 |
| GAJNO / PERDO | 0.- | + 4'925.85 |

## Kapitalo

| | Aktivoj |
|---|---|
| Gastejo Edm. Privat | 4'275.45 |
| Biloj SKA | 15'000.- |
| Inventaro | 1.- |
| Fonduso centjara jubileo de Esp. | |
| SKA kuranta konto | 7'880.25 |
| Junulara vojaĝfonduso | |
| Anticipaj imp. SKA, bonhavo de ESV | 445.65 |
| Transajeroj aktivaj k. pasivaj | |
| Kapitalo 21'864.— (1.1.89) | |
| plus gajno 4'925.85 (kiel supre) | |
| min. pago el GEP 4'000.- (Komputilo KCE) | |
| | 27'602.35 |

## Reserva kapitalo

| | Aktivoj |
|---|---|
| Biloj SVB | 9'000.- |
| Deponeja konto SVB | 1'003.- |
| Separita konto SKA | 9'396.55 |
| Anticipaj imp. bonhavo de ESV | 126.20 |
| Fonduso 18'839.15 (1.1.89) | |
| plus kresko 337.— (1.1.87 ĝis 17.3.89) | |
| plus interezo 360.60 (malneta) | |
| min. bankspez. 11.— (SVB) | |
| | 19'525.75 |

Kasisto: Ernst von May, Oberuzwil, 31-an de decembro 1989

E. v. May

## FINANCA RAPORTO

En la financa raporto ni ne ripetos tion, kion la kaskontrolantoj kaj la bilanco klare priskribas. Ni prefere lumigu tiklan punkton.

Kio plej frapas, kiam oni analizas la kontojn de SES, tio estas la neuzo de la monsumo antaŭvidita por la propagando kaj varbado, kaj la limigita uzo de la sumo dediĉota al administraj kostoj. Jaron post jaro ripetiĝas tiu fenomeno, kiu pruvas, ke SES mem ne reale aktivas. Ĝia statuta celo estas: "Disvastigi en Svislando la lingvon Esperanto kaj kulturi ĝin en ĉiuj manieroj" kaj "Kunlabori aŭ rilati kun aliaj esperanto-organizaĵoj". Fakte SES ne povas mem plenumi sian statutan celon. Tial daŭre ekzistas neuzita fonduso por la centjara jubileo de esperanto, kiu restadas en la kuranta konto sub la formo de sumo de pli ol 7'800.- frankoj.

Estas konate, ke pro la agada stagno de SES, Kultura Centro Esperantista devis transpreni taskojn, kiuj laŭstatute ne devus esti ĝiaj. Tial la tuta financa pezo de la festado de la centjara jubileo de esperanto, de la esperanto-propagando, de la funkciado de la perkorespondaj kursoj, de la respondo al informpetoj, ktp., ŝarĝas pli kaj pli la kontojn de KCE, dum SES konas gajnojn fakte mensogajn.

Analizo de la reala situacio kondukas al la konstato, ke SES ne estas ekipita por plenumi aktivecojn, kiujn fakte plenumas ĉu KCE, ĉu la lokaj esperanto-societoj. Tial la buĝeto por 1990 proponos subvenciadon al agadoj, kiuj korespondas al la celoj de SES. Tiel markiĝos la reala kunlaboro inter SES kaj la esperanto-organizaĵoj de Svislando.

-oOo-

## RAPORTO DE LA CENTRA KOMITATO

### Foresto de la ĝenerala sekretario

Andy KÜNZLI dum la plimulto de la jaro 1989-a restadis en Moskvo pro studaj kaŭzoj. Tial la sekretaria aktiveco de SES fakte rekomenciĝis nur fine de la jaro 1989-a, post lia reveno el Sovetio. Sed ni ne forgesu mencii, ke Andy KÜNZLI interrompis sian restadon en Ruslando por povi ĉeesti la ĝeneralan kunvenon kaj redakti ties protokolon.

### Rilatoj kun la aŭtoritatoj

La sekretario kaj la prezidanto havis la okazon sendi leterojn al publikaj kaj movadaj instancoj en- kaj ekster-landaj, esprimante la ĝeneralan vidpunkton de la svisaj esperantistoj. Ekzemple la okazaĵoj en la orienteŭropaj landoj ne povis resti sen reago flanke de SES. Ankaŭ esperanto-grupoj sentis la bezonon ne resti pasivaj antaŭ la aktualaj eventoj. Estas bezono havi agadprincipojn, kiuj difinu la reciprokajn respondecojn de SES kaj de la lokaj societoj por la rilatoj kun la aŭtoritatoj. Tiu diskuttemo povos eniri la tagordon de kunsido de la Federa Konsilio.

### Svisa Esperanto-Revuo kaj SES informas

Ni esprimis nian vidpunkton en la januara **SES informas** koncerne al la revua demando. Ni multe dankas al Andres BICKEL pro la modela laboro plenumita ĝis nun kaj esperas daŭre povi kalkuli pri liaj helpo kaj konsiloj en la venonta jaro. Estas interese konstati, ke al nia februara **SES informas** aldoniĝas dokumentoj ricevitaj de **Internacia Esperanto-Semajno okazonta en Nico** kaj de **Kultura Esperanto-Domo en Grésillon.** Anonciĝis aliaj dokumentoj. La formulo ŝajnas korespondi al bezono. Ni estas kontentaj, ke ni povis eksperimenti ĝin antaŭ la ĝenerala kunveno.

### Ĝenerala kunveno

La Centra Komitato decidis, ke se neniu loka grupo aŭ aktiva esperantisto pretas inviti al sia urbo la ĝeneralan kunvenon de SES, tiu ĉi okazos principe en Berno. Ni do jam nun atendas invitproponon por 1991.

(Daŭrigo de la raporto en la marta **SES-informas**)